# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 12 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 12

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

## FOR LA BURĜAN LIBERPENSON!

Sen ia ebla dubo, nia sennaciula liberpensula paĝo celas sennaciigi la liberpenson. Tre bone! Sed por proletoj tia postulo ne sufiĉas — almenaŭ ĝi postulas klarigon.

SAT tre bone agis forĵetinte la neŭtralismon el sia movado. Ĝi estas proleta organizo, do, logike, ĝi devas forigi el la cerboj de la proletoj ĉiujn burĝajn ideojn, aŭ pli bone dirite: neniigi ĉe la proletaro ĉiujn ideojn, kiuj ne estas proletecaj. Kaj se oni akceptas tiun bazon por la SAT-laboro ĝenerale, ankaŭ oni devas ĝin akcepti por la SAT-liberpensula sekcio.

Tiam, por ne labori en profunda konfuzo, oni devas sin demandi: Kio estas la liberpenso? Ĉu tiu ideo havas la saman signifon por la burĝaro kiel por la proletaro?

La gvidantoj de la eksfama "Internacia Federacio de la Liberpensuloj", kies sidejo estas en Bruselo, respondas: "Jes, ĉar nia Liberpenso estas super la klasoj kaj partioj".

Ni ne faru ludvortojn aŭ aliajn ŝercojn, tiom ridegindaj ajn ili povus esti! Ne, ni pripensu serioze. Ĉu superklasa filozofio povas liberigi aŭ dormigi la penson de la proletaro? Klopodi por altigi la proletan penson super la klasoj, ĉu tio ne estas efika provo por ĝin neŭtraligi? Ĉu adeptoj de tia filozofio baraktante superklase, kun maskitaj vizaĝoj, seninteresiĝante pri la klasbatalo, ne scias, kiagrade la penso de la proletaro estas subpremata? Ĉu ili ne scias, ke elklasigi nian penson estas ĝin neŭtraligi en ĝia propra sklaveco? Ĉu vere ili ne scias tion?

Oni povus multe pridiskuti tiun demandon... sen iu fundamenta utilo. Pli utile estas ekzemple kapti la plej radikalan principon de tiuj ennubigantoj, kaj ĉerpi el ĝi ĝian proletan signifon, forlasante la neŭtralan, kiel laborist-kaptilon. Tio estas — kiam realiĝas! — la ateismo.

Laboristoj scipovu forĵeti la neverŝajnan dion ĉielan. Per ĝi oni elvojigas la penson de ĉiuj kredantaj je ĝi. Sed la neŭtralaj liberpensuloj forĵetante la ĉielan dion, sin kunigas kun la surteraj dioj de la burĝa demokratio, kiu celas envojigi la penson de l' laboristoj al la labirinto de la burĝa reĝimo!

Estas vere por la burĝaro kaj parte por la proletaro, ke la penso liberiĝas per forĵeto de la religiaj dogmoj, sed la konsciaj laboristoj ne devas forgesi, ke nuntempe la religiaj iluzioj kreskas tre bone dank' al la mizeregoj senesperigaj, neapartigeblaj de la kapitalismo, kaj ili pli bone ankaŭ subtenas ĉi tiun. La burĝaro ne bezonas religiojn por si mem, sed ĝi bezonas ilin por la proletaro.

Jes, la penso liberiĝas per forĵeto de la religiaj kredoj. Tamen, diru al mi, Gek-doj, kiuj ne plu kredas je tiuj absurdoj, ĉu vi sentas vian penson vere libera? Kontraŭe, ĉu vi ne konscias, ke la idearo, ke la tuta pensmaniero, ke la tuta reĝimo burĝa malhelpas la disvolviĝon de viaj naturaj penskapabloj?

La kredo, ke sole la religiaj ideoj malliberigas la penson, estas etburĝa koncepto, kiu siaparte mem malliberigas la vivon kaj konsekvence la penson de la proletaro en la kadroj de la burĝa reĝimo.

Estas necese senŝeligi ĉiujn vortojn, kiujn la burĝaro uzas por elvojigi la liberecajn ideojn de sia sklavaro. Ĉi tie mankas loko por tiom granda laboro. Tamen ni devas iomete klarigi la esencajn bazojn de niaj revoluciemaj kritikoj.

"Liberpenso" jam estas vorte plenplena da multnombraj konfuzoj. Ĉu nia penso povas esti tute libera? Ne, ĉar laŭ la naturaj leĝoj, la penso estas haltigata de ĉiuspecaj malhelpoj, kiujn ĝi ne povas renversi. Aliparte, la homo ne povas ne pensi; ĝia cerbo, vole-nevole, funkcias kaj produktas pensojn, tiel necese, kiel la suno produktas varmon, lumon, elektron ktp. Fine, la penso de ĉiu homo dependas de lia materia medio, kaj la penso de ĉiuj kiuj influas ĉiun, ankaŭ dependas de tiu medio; kaj la cerbo, kiu konsistas antaŭ ĉio el heredaĵo de la praavoj, ankaŭ dependas de la materiaj medioj, en kiuj vivon pasigis tiuj lastaj.

De tio rezultas, ke per ĉiuj homoj la penso ne povas esti tute libera, sed ke ĝi fariĝas libera laŭmezure kiel ĝi scipovas forĵeti la barojn, la barilojn, kiuj emas haltigi ĝin, kaj mallibera laŭmezure kiel tiuj malhelpoj estas pli fortaj ol ĝi.

Ni aldonu, ke entute, malgraŭ multnombraj esceptoj, la homa penso, depost sia ekkomenco, estas fariĝinta pli kaj pli venkkapabla. Nuntempe ĝia kapablo estas tiom forta, ke estas malfacile dubi, ke ĝi estas daŭrigonta la saman disvolviĝon ĝis la formortado de la materiaj kondiĉoj de la homaj vivrimedoj.

La homo estas la plej perfekta kaj la plej perfektiĝema aspekto de la materio — almenaŭ surtere. Sed ĝi ne povas sendependiĝi sin el ĉiuj aliaj aspektoj. Estas erarego konsideri la psikologian faktoron, kiel ĉefan faktoron determinantan, ĉar ĝi mem estas estigita de la materia medio.

Sed kio, kia kaj kiela estas la materia medio?

Dum la epoko, kiu antaŭis la artefaritajn produktrimedojn, estis nur la natura medio, en kiu la homoj baraktis per siaj solaj membroj. —

Post kiam la homoj laboris per artefaritaj iloj, nepre la medio fariĝis pli kaj pli ekonomia laŭ la disvolviĝo de la produktrimedoj.

Oni facile komprenas, ke la natura kaj la artefarita medioj similas en tio, ke ambaŭ estis ŝanĝiĝantaj kaj devigis la homojn luktadi por sin adapti al ili kaj perfektigi la artefaritan.

Tiele la ekonomia (do materia) medio aliigis la homojn, kaj tiuj ĉi la medion, ĉiam preparante novajn reciprokajn ŝanĝojn. Tiu fariĝo daŭras kaj daŭros...

El tiu vidpunkto oni povas pasie sekvi tra la historio la nefiniĝontan estontan fariĝon de la homoj, kaj oni facile komprenas, ke en la nuntempaj socioj la materia medio ne estas la sama por ĉiuj homoj. La burĝa medio, kiu estas riĉa, komforta, neelĉerpiĝema, bonviviga, kompreneble tute taŭgas al la burĝoj, eĉ senreligiuloj, kaj al iliaj kaserolaj likiistoj (? Red.)! Ilia penso ne povas esti revoluciema, kaj ili zorgas, por ke ni akceptu ilian koncepton pri la liberpenso. Ĉu estas miriga, ke ili estas konservemuloj, ke ili sin starigas ne nur kontraŭ la feŭdemulojn, — retroiremajn al la tielnomata "bona pratempo" — sed precipe kontraŭ la "sindikatan despotismon kaj la sovaĝan revolucion proletan"?

Sed la materia medio de la proletoj, malriĉa, laciga, infere senespera, ne taŭgas por tiuj produktantoj de ĉiuj riĉoj, por la senpanuloj, por la t. n. "materialo homa". Ĉu estas miriga, ke tiu medio encerbigas al siaj viktimoj alian koncepton pri la libero?

Por duone klarvidanta proleto senreligia tio sufiĉas por kompreni, ke la liberpenso estas klasproblemo.

Gelaboristoj, kiuj forĵetis la religiojn, aliĝu vian sekcion de la Internacio de la proleta Liberpenso (germanlingve: Internationale Proletarischer Freidenker — IPF). Ĝi estas kiel SAT kaj devas absolute resti organize sen politika tendenco. — Al ĉiu organizo siaj taskoj! — La taskoj de IPF estas starigi kaj disvastigi tra la mondo la proletan filozofion, unuigante ĉiujn proletojn senreligiajn.

*Emilo Chapelier (9106), Bruselo.*

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"